# Norvega Esperantisto


ESPERANTOBLADET

N-ro 2 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CHEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH


3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

## Landa Kongreso de NEL



SAUDA — la geografia kaj eble ankaŭ la esperantista centro inter Bergen kaj Stavanger—estas ĉijare elektita kiel loko de la landa kongreso de Norvega Esperantista Ligo. La kongreso okazos en la pentekostaj tagoj de la 13-a ĝis la 15-a de majo.

# Bonvenon al landa kongreso en Sauda!



*Johan Matland, Prezidento de La Esperantoklubo de Sauda kaj de Okcidenta Distrikto de N E L.*

Sauda situas ĉe la fino de longa fjordo 100 kilometrojn norde de Stavanger en tipe okcidentnorvega naturo. La altaj montoj kun lagetoj kaj akvofaloj, abunda pluvo kaj neĝo allogis la industriulojn. Antaŭ 50 jaroj oni komencis utiligi la akvoforton kaj konstrui fabrikon. La industrio ŝanĝis la kamparan loketon kaj ĝian vivkondiĉon. Sauda havas hodiaŭ 6 000 enloĝantojn kiuj ĉefe vivas pere de la industrio. Aktieselskabet Saudefaldene produktas elektran energion kiu plejparte estas utiligita en la fandejo Electric Furnace Products Company, Limited. E F P, kiu estas la populara nomo de la fabriko, importas krudan materialon kaj per elektra energio fandas feroalojojn, speciale feromanganon kaj silikomanganon por la ŝtalindustrio, ĉefe en Eŭropo. Norvega naturoriĉeco kaj amerika kapitalo ebligis la fondadon de industrio en Sauda.

Sed Sauda ne nur estas industria loko, ĝia naturo ankaŭ allogas turistojn somere kaj vintre. La montoj, lagetoj kaj akvofaloj estas facile atingeblaj laŭ la valoj Svandalen, Åbödalen, Nordstöldalen kaj Slettedalen per aŭtomobilo. Ankaŭ la montaron inter Sauda kaj Röldal oni nun povas atingi per aŭtomobilo. Du la vintro la entuziasmaj skituristoj invadas Sauda, dum la somero la eksterlandaj turistoj ĝuas la restadon ĉi tie. Pentekoston 1967 ni rezervis por la esperantistoj norvegaj kaj eksterlandaj! Krom la naturo, kiu estas la plej granda vidindaĵo, ankaŭ estas tre interesaj teknikaj konstruaĵoj, ekzemple Slettedalsdammen kiu estas la plej alta arkodigo de Nord-Eŭropo. Vizito en la fandejo de E F P ankaŭ estas interesa travivaĵo.

La Esperantoklubo de Sauda povas festi sian 30 jaran ekzistadon ĉijare, kaj estas speciala ĝojo por la klubo inviti al landa kongreso en la jubilea jaro. Unufoje antaŭe, en la jaro 1939, landa kongreso okazis en Sauda. Kompare al la norbro de enloĝantoj estis ĉiam multaj esperantistoj kaj aktiva Esperantoklubo en Sauda. Unu el niaj aktivecoj en ĉi tiu jaro estas la aranĝo de la landa kongreso. Nia klubo invitas vin al la bela vilaĝo Sauda kaj al la landa kongreso pentekoste. Venu multnombre de la tuta lando, ni kore bonvenigas vin!

*Johan Matland.*

---

## KLUBAJ JUBILEOJ

La 22-an de marto estis 30-jara Sauda Esperantoklubb, tiu klubo, kiu invitas al la ĉijara landa kongreso.

La 7-an de aprilo estis 30 jara la klubo en Skudeneshavn, La Granda Ideo.

«ESPERANTO EN KOMERCO» kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo g.m. 2,—; ekde 10 libroj g. m. 1,35. Esperanto-Rondo, 718, *Crailsheim*, Germanujo.





**Norvega Esperantisto**

ESPERANTOBLADET

*Redakcio:* Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach

*Adreso de la redakcio:* Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20-a en la monato antaŭ la apero.)

*Abonprezo:* En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

*Anoncprezoj:* 1/1 paĝo kr. 150,00 ½ p. kr. 75,00, ¼ p. kr. 38,00, ⅛ p. kr. 19,00.

# Sauda kaj Tel Aviv

Povas ŝajni tre strange por ĉiu neesperantisto la apudmeto de tiuj du loknomoj. La simileco de la du lokoj vere ne estas tre granda.

Sed por norvegaj esperantistoj ambaŭ nomoj estas ligitaj kun venontsomeraj eventoj. Sauda invitas al la landa kongreso, Tel Aviv al universala kongreso. Ambaŭ lokoj estas gravaj renkontejoj por vojaĝemaj esperantistoj, ambaŭ lokoj estos kvazaŭ sidejoj de Esperantaj parlamentoj. Kaj vi estas la parlamentanoj.

Jena numero de nia gazeto estas dediĉita al Sauda kaj la Tel Aviv, kun la espero, ke ĝi povu al kiel eble multaj doni emon al vizito de unu el la lokoj.

---

## *Informoj de la Ekzamena Komisiono*

*Ordinaraj printempaj ekzamenoj.* Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1967. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Majo.* Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du —skemojn. *Planigu la skemojn precize kaj komplete! — Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

*Ekzamenoj dum la Landa Kongreso.* La Landa Kongreso okazos en Sauda 13.—15. Majo. Kandidatoj, kiuj deziras fari elementan aŭ superan ekzamenon dum la Landa Kongreso, anoncu sin, per la presita skemo (vidu supre), rekte al la Ekzamena Komisiono antaŭ la 15a de Aprilo.

NB! Nur personoj loĝantaj el lokoj, kie

## SCIIGOJ DE N.E.L.

*La subskribkampanjo daŭras!* U.E.A. informas ke kvankam la propono al U.N.O. kun la subskriboj el la tuta mondo estas jam transdonita, oni povas daŭre akcepti subskribojn, transsendotajn al U.N.O. kiel aldonon. Tial ni petas niajn membrojn daŭrigi la kolektadon de subskriboj. Folioj estas riceveblaj de N.E.L.

*La norveglingva eldono de «Vivo de Zamenhof».* Ni memorigas pri tio ke N.E.L. transprenis la reststokon de tiu grava, valora kaj interesa libro tre malmultekoste, kaj ni nun vendas ĝin por po kr. 3,00. La stoko ligas grandan parton de nia modesta kapitalo, kaj aliflanke la libroj faros utilon nur kiam ili estos disvenditaj! Tial ni admonas la membrojn amase aĉeti de ni la libron, kiu estos taŭga donaco al viaj amikoj kaj konatoj. La kluboj povas kolekti mendojn de la membroj kaj sendi kune por ŝpari afrankon.

*Taskotabelo por la kluboj. — Marto.* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La klubo elektas reprezentantojn al la Landa Kongreso en Sauda. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon.

*La Liga Estraro.*

# Israelo – la lando de la 52-a Universala Kongreso de Esperanto



Laŭ la israela statistika monata bulteno publikigita en Jerusalemo Israelo en septembro 1966 havis 2 643 100 loĝantojn, en tio 2 333 700 judojn.

---

ne troviĝas loka ekzamena komitato, povos fari ekzamenon dum la Landa Kongreso.

*Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:*

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 842, Oslo. Poŝtĝirokonto 100 34.

BERGEN: S.ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6 B, Bergen.

HAUGESUND: S.ro Olav Thormodsen, Boks 59, Haugesund.

SARPSBORG: S.ro Johan Hammond Rosbach, Huldervn. 17 B, Sarpsborg.

SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkevn. 50, Sauda.

TROMSØ: S.ro Arne Høgseth, Sjøgt. 5, Tromsø.

TRONDHEJMO: S.ro Ragnv. Rian, Boks 109, Trondhejmo.

Ekzamena Komisiono de N. E. L.
*C. Støp-Bowitz*
prezidanto.

Laŭ la informo de la statistika jarlibro eldonita de UNESCO en Parizo denseco de loĝantaro en Israelo je 1. km kvadr. estas 120 personoj, kompare kun la najbaraj landoj: Jardenio — 19, Egiptujo — 29, Sirio — 29, Libano — 216.

Teritorio de Israelo estas 20 700 km. kvadr. kompare al Jardenio — 97 740, Egiptujo — 1 000 000, Sirio - - 185 180 kaj Libano — 10 400 km kvadr.

En Israelo analfabetoj formas 12,1 % de la loĝantaro, en Jardenio — 67,6 %, Sirio — 70,5 %, Egiptujo — 80,5 % de la loĝantaro.

*

Laŭ la bulteno de la statistika oficejo estas en Israelo 4 urboj kun bli ol 100 000 loĝantoj. Tel Aviv, Haifa, Jerusalemo, Ramat Gan. En 5 urboj nombro da loĝantoj estas inter 50 000 ĝis 100 000. 10 urboj havas 25 000 — 50 000 leĝantojn. Entute en Israelo estas 26 urboj.

*

En 1966 alvenis en Israelon 328 100 turistoj. t.e. je 11 % pli multe ol en 1965.





# UNESKO-novajhoj

*Pencho Slavejkov (1866—1912): Poeto de la Bulgara liberigho*

Por bulgaroj la nomo de Pencho Slavejkov estas por chiam ligita kun unu el la plej dramaj periodoj de la historio de ilia lando: la liberigho de Bulgarujo en 1878 post kvin jarcentoj da otomana regado.

Penco Slavejkov naskighis en la urbo Triavna je la 27-a de aprilo 1866, filo de poeto, kiu mem, kun grupo da aliaj intelektuloj, havis gvidan rolon en la bulgara renesanco de la 19-a jarcento. En 1876, tiam dekjara, Pencho vidis mem la popolan ribelon en Stara Zagora, kiu ekbruligis tutlandan ribeladon. La tieaj scenoj de malpaco kaj batalado lasis profundan impreson en la knaba

---

185 700 turistoj venis tra aervojo al la flug haveno en Lod, 76 400 perŝipe al la haveno en Haifa kaj 66 000 tra la limloko kun Jardenio en Jerusalemo.

Oni devas substreki, ke 74 % de la tuta nombro de turistoj venis en la landon en monatoj marto — septembro.

*

Laŭ la informo de afergvidanto de Ministerio de Turismo en Israelo en 1967 okazos 42 internaciaj kongresoj kaj konferencoj. Je la unua loko, menciita de la afergvidanto troviĝas la Universala Kongreso de Esperanto en Tel Aviv, okazonta de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto.

La Internacia Kongreso de Inĝenieroj kaj Arhitektoj okazos de la 20-a ĝis la 25-a de julio kun partopreno de pli ol 1 000 personoj.

En 1966 okazis en Israelo 27 internaciaj kongresoj kaj konferencoj kun partopreno de 10 000 personoj el plej diversaj landoj.

*

Ne hezitu kaj tuj aliĝu al la 52-a Universala Kongreso da Esperanto en Tel Aviv, Israelo!

Uzu la okazon por viziti la unikan landon de la Kongreso!

Israelo plej kore invitas vin!!

*Mag. Isaj Dratwer*
Prezidanto de Esperanto-Ligo Israela

menso kaj farighis poste temo de liaj plej gloraj versoj. Lia plej konata verko estas «Sanga kanto», kies temo estas ghuste tiu ribelo de 1876. Kvankam li prilaboris ghin dum 20 jaroj, ankorau ghi estis nefinita, kiam li mortis.

«Sanga kanto» aperis en fragmenta traduko en Esperanto de Ilia Silvestriev, en 1927. (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

*Proteinoj el natura gaso*

Du britaj petrol-sciencistoj, d-roj J. R. Norris kaj D. W. Ribbon, sukcesis shanghi metanon — unu el la chefaj elementoj de natura gaso — en mangheblajn proteinojn. La proteinon produktas bakterio, kiu nutras sin ekskluzive per metano kaj eligas blankan, flokecan substancon kun protein-enhavo inter 40 kaj 50 %. Tiun substancon, cetere sengustan, manghis jam diversaj laboratoriaj bestoj kaj ankau, je malgrandaj kvantoj, la sciencistoj mem.

Dum multaj jaroj du aliaj petrol-kompanioj same eksperimentadis por produkti proteinojn el la neuzeblaj rezultajhoj de la nafto- rafina proceso. (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

*Gravaj fosili-eltrovoj en chado*

Fosialia skeleto de «stegodono», primitiva speco de elefanto, kiu lausupoze atingis Afrikon el Azio dum la kvaternara periodo, malkovrighis en Chado, ch. 500 mejlojn (800 km) de Fort Lamy. Lau la formo de kranio oni povas konjekti, ke la besto havis kvar dentegojn, el kiuj la malsupran paron ghi povis uzi por elradiki arbojn. Aliloke, la sama grupo de sciencistoj, kies laboron pagas la chada registaro, elterigis restajhojn de 25 aliaj specioj apartenantaj la al sama periodo.

Chiujn chi fosiliojn fine elmontros la natur-historia muzeo konstruota apud Fort Lamy. La Nacia Instituto de Chado havas jam fosili-sekcion, kaj faka biblioteko estas kolektata. Pro la multedo de la fosili-restajhoj sur chada teritorio facile povas esti, ke Fort Lamy konatighos kiel internacia centro de paleontologiaj esploroj. (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

*Chu jordanianinoj vochdonos?*

Atinginte «altan nivelon de kulturo kaj politika konscio», jordaniaj virinoj devus kontribui al la progresigo de demokratio.

# Våre fellesreiser til Esperantokongressen i Israel

Fra 2. august i år er esperantister fra alle verdensdeler samlet til verdenskongress i Tel Aviv i en uke. Det er første gang vår verdenskongress blir holdt i Israel, og det vil sikkert vare lenge før det skjer igjen. Hvem har ikke ønsket før eller senere å komme til Bibelens land? I år har esperantister sjansen til å få ønsket oppfylt.

Mange har gjerne villet at det skulle bli arrangert en fellesreise til kongressen. Forbundets «Turisma Servo» — som består av fru Kirsten Ek — har gjennomgått en mengde muligheter, forslag og tilbud, og nå foreligger reiseplanene. «Turisma Servo» kan tilby to forskjellige reiser:

*Reise A: Skandinavisk flyreise*

arrangeres av Dansk Esperanto-Forbund i samarbeid med El Al og med de øvrige nordiske Esperantoforbund. Dette er en to ukers tur, som starter fra København lørdag 29. juli med ankomst til Tel Aviv samme dag. Reisen koster danske kroner 1 900,00 (ca. 2 000,00 i norske penger), og denne prisen omfatter: Flyreise frem og tilbake mellom Københav nog Tel Aviv, hotellopphold i dobbeltværelse med frokost (men ingen andre måltider) og utflukter til Nazaret, Genesaretsjøen, en kibutz og Jerusalem. Ordinært flyr man tilbake til København etter 14 dager; men de som ønsker det kan utsette hjemreisen og for egen regning se mer av Israel på egen hånd eller som deltaker i en av UEA's rundturer i tilslutning til kongressen.

Leder for reisen er Gustav Kühlmann, en kjent mann i dansk Esperantobevegelse, som har lang erfaring med ledelse av kongressreiser.

*Reise B: Rundreise Oslo — København — Tel Aviv — Haifa — Tiberias — Jerusalem — Jordan — Beirut — København — Oslo*

arrangert av Norsk Esperanto-Forbund i samarbeid med reisebyrået Globus.

Dette arrangementet tar særlig sikte på de esperantister som har hatt et sterkt ønske om å komme til den jordanske del av Jerusalem, Betania, Jeriko, elven Jordan og Det Døde Hav i forbindelse med kongressreisen.

Reisen starter fra Oslo med fly 1. august. Vi mellomlander i København og Zürich og kommer til Tel Aviv samme dag. De 8 kongressdagene blir det opphold i godt hotell i Tel Aviv med «halvpensjon» (frokost og middag). Deretter blir det rundtur i Israel, i Jerusalem overgang over grensen til Jordan, og opphold i den jordanske del av Jerusalem 11.—14. august. Under oppholdet her blir det rundturer til Betlehem, Hebron, Betania, Jeriko, elven Jordan og Det Døde Hav. Det fortsettes med fly til Beirut i Libanon 14. august, og til København - - Oslo 16. august.

Ved avtale på forhånd kan det gjøres opphold i København ved tidligere avreise fra Oslo eller senere hjemreise fra København.

Prisen for denne turen er kroner 2 585,00 og omfatter hotell med «halvpensjon» i Tel Aviv og Beirut og hoteller og alle måltider under reisen fra Tel Aviv til Beirut. Det er anledning til å starte og avslutte reisen i København, og prisen er da litt lavere.


For begge reiser gjelder at innmelding skjer til Turisma Servo. Av reisens pris betales kr. 100 ved innmeldingen og resten innen en frist som man vil få oppgitt fra Tursima Servo. Det er satt forholdsvis korte frister for innmelding.

Vi håper alle norske esperantister vil tenke på dette og at mange blir med og tar med familie og venner. Adressen for alle henvendelser om kongressen og reisene er: Turisma Servo de Norvega Esperantista Ligo, Boks 942 Sentrum, Oslo 1.

Dit skal man skrive etter innmeldingsblankett til kongressen og detaljerte reiseprogrammer.

Vent ikke til alle plasser er opptatt!

*La minejoj de reĝo Salomono ĉe Eilat.*



Tiel deklaris Regho Hussein de Jordanio. La Regho petis la Chef-Ministron, Wasfi Tall, revizii la nunajn elektoleghon de Jordanio por rajtigi al virinoj baloti. (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

*Tanzaniaj monumentoj riparataj por turismo*

Komencighis laboroj por ripari ruinighintajn fragmentojn de la kulturaj restajhoj kaj arhhitekturajhoj, kiujn mahometanoj el Omano kaj la Persa Golfo postlasis lau la marbordo de Tanzanio.

Interesaj monumentoj trovighas plurloke, interalie apud la fishista vilagho Kunduchi, 16 mejlojn (26 km) norde de Dar-es-Salamo. Tie la tanzania Konservisto de Antikvajhoj, s-ro Hamo Sassoon, la laboris dum tuta jaro, kaj la loko rapide diskonighis kaj allogis turistojn.

La ruinoj de Kunduchi konsistas el tomboj de la 18-a jarcento kaj moskeo el korala shtono konstruita en la 15-a jarcento kaj poste beligita per ornamaj gipsaj modlajhoj.

*Laseroj uzataj por rektigi tunel-boradon*

Lasero-radioj estas nun jam uzataj por ebligi grandan precizecon dum tunelborado. En Nova Meksiko, Usono, irigacia tunelo de 2,4 km (1½ mejloj) deviis entute per ne pli ol 1,6 cm. (5/8 colo). La grandan precizecon oni shuldas chefe al rektigilo, kiu uzas gas-laseron.

La uzo de lasero anstatau de la lampoj normale uzataj dum tunelkonstruado donas tre potencan radion, kiu estas uzebla por pli grandaj distancoj kaj kiu ech penetras pòlvonubojn. La radio de la lasero trafas du fotochelojn muntitajn sur la bor-machino. Tio siavice briligas lampetojn sur kontrol-tabulo antau la stiristo, kiu per ties helpo povas korekti devion tuj kiam ghi komencighas. (Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

## J. R. G. Isbrucker

La 20an de Januaro forpasis inĝeniero Johannes R. G. Isbrucker en Hago, en sia 77a vivojaro. En la internacia Esperantomovado li ĝuis grandan famon, pro siaj verkoj kaj tradukoj, kiel L.K.K.-prezidanto de du Universalaj Kongresoj, sed antaŭ ĉio kiel multjara prezidanto de Akademio de Esperanto.

Esperantisto de 1909 Isbrucker fariĝis membro de la Lingva Komitato en 1921 kaj de la Akademio en 1922, kies prezidanto li estis dum pli ol 25 jaroj. Kun firma rezistemo li rebatis ĉiujn atencojn kontraŭ la lingvo flanke de reformemuloj kaj «plibonigantoj». Li partoprenis preskaŭ ĉiujn Universalajn Kongresojn post la unua mondmilito, kaj pli ol 40-foje li reprezentis la Nederlandan registaron dum la kongresoj. Siajn lastajn jarojn li dediĉis al la kompilado de granda nederlanda Esperanto-vortaro.

Ni deziras pacon al lia memoro.


*C. S.-B.*

## Per Vasmoen

La 10an de Februaro forpasis aktuaro Per Vasmoen, Tynset.


Vasmoen apartenis al la pioniroj de Esperanto en Norvegujo, kaj li estis dumviva membro de N.E.L. Afabla kaj bonkora, sed tre modesta li estis, kaj la esperantistaro apenaŭ multe konis lin, sed ĉiam li malavare subtenis la movadon en diversaj manieroj.

Pacon al lia memoro. *C. S.-B.*



AKTIESELSKABET SAUDAFALDENE, SAUDA

Produktas elektran energion por industrio kaj komunumoj. Post pretigo de la stacio Sauda IV la tuta efekto estos 154 000 kW.




ELECTRIC FURNACE PRODUCTS COMPANY, LIMITED, SAUDA

Feroaloja fandejo elektra, unu el la plej grandaj en Eŭropo. Fondita 1915. Longa sperto je dispono por la ŝtalindustrio. Specialaĵoj: Feromangano kaj silikomangano.




NORVEGA ESPERANTISTO

IRU
AL
SAUDA



— rapide per la hidrofojlboato «Ekspressen», ĉiutage el Stavanger je la 17a al Sauda je la 18:40a horoj. Loko por 62 pasaĝeroj. Mendu lokon antaŭ.
— trankvile per la ŝipoj «Fjordbris» kaj «Fjordsol» el Stavanger je la 9:30a al Sauda je la 14:30a aŭ el Stavanger je la 14:15a al Sauda je la 19a.
Loko ankaŭ por aŭtomobiloj. Bonan vojaĝon!

DET STAVANGERSKE DAMPSKIBSSELSKAB



## Sauda Fjord Hotel

SAUDASJØEN

Bela situo en kvieta loko 3 km for de Sauda.
Akceptas gastojn en ĉiuj sezonoj.

## GRAND HOTELL

SAUDA

Hejmeca hotelo en la centro de Sauda. Moderaj prezoj «Bona manĝaĵo.»
Ni zorgos por via bonfarto ĉi tie.
Bonvenon al ni!

FLY MED GLOBUS/SAS/SWISSAIR TIL

Verdensmøtet, Tel Aviv

OG BESØK SAMTIDIG

Det farverike Midtøsten



AVREISE FRA OSLO OG
KØBENHAVN: 1. AUGUST
VARIGHET: 16 DAGER

PROGRAM:

**ISRAEL:**
Tel Aviv — Natania — Cæsarea — Nasaret — Haifa — Genesaret — Jerusalem

**Jordan:**
Jerusalem — Betlehem — Hebron — Jeriko — Det døde hav

**Libanon:**
Beirut

SE ISRAEL OG JORDAN
DET HELLIGE LAND

Priser:

Fra Oslo n.kr. 2 585,00
Fra København d.kr. 2 345,00


Be om spesialprogram
Arr. Norsk Esperanto-Forbund.

GLOBUS REISEBYRÅ

Møllergt. 20,
OSLO
41 21 20







*Panoramo el Galileo sur Lago Genesaret.*

# ISRAELO

Rigardante la landkarton tuj frapas nin la malgrandeco de la tereno—nur iomete pli granda ol duono de Nederlando estas la lando. Ĝi ampleksas proksimume nur unu sesonon de la iama Palestino.

Frapas nin ankaŭ la nenormalaj limkadroj: nenormala longeco (1 250 km.) kaj same nenormala mallarĝeco. En la plej vasta punkto, la landlarĝeco atingas 60 km., en la plei mallarĝa nur 15.

Kvankam la lando estas eta, ĝi estas multvizaĝa, posedante diverskarakteran pejzaĝon: altan montaron, malaltajn ebenojn, valkampojn, profundajn abismojn, belajn marbordojn, lagojn, riverojn, ĝardenojn, arbarojn kaj dezertojn. Ankaŭ la klimatkondiĉoj estas akre diferencaj: en Julio, kiam la temperaturo en la Sarona valo povas atingi 30 gradojn kun malseka aero, en Jerusalemo aŭ en la Galilea montaro povas la temperaturo esti nur 20 gradoj, kun freŝaj, sekaeraj ventoj. Samtempe en Ejlat kies ondoj estas dum la tuta jaro varmaj kaj banallogaj, povas la temperaturo esti 40 gradoj, sed la aero seka kaj agrabla. Ne ekzistas la jaraj «kvar sezonoj» Printempo kaj aŭtuno estas tre mallongaj. Oni parolas pri du sezonoj: «sun-sezono» kaj «pluv-sezono», tiel estas eble projekti liberaerajn aranĝojn monatojn antaŭe sen riski fiaskon pro pluvo. Antaŭ la lasta mondmilito, kiam la limoj ne estis fermitaj, la popolo ŝerce diris: «La klimato de Palestino estas la plej oportuna en la mondo, la vintron oni povas pasigi en Egiptujo, la someron—sur Libana montaro — —»

La geopolitika signifo de la lando estis ĝia situo inter tri kontinentoj, tial batalis la grandpotencoj por akiri la superregon. Kaj ĉiu epoko postlasis ĝiajn ŝpurojn en formo de ruinoj, enskriboj k.t.p.

La lastaj regintoj kies agado en la lando ni plej bone konas, ne postlasas imponajn rezultojn, kaj la judaj pioniroj, kiuj venis, ne trovis landon, pri kiu oni iam diris, ke abundas lakto kaj mielo. Kontraŭe, ŝtono kaj dezerto, kaktoj kaj malario abundis. Ne estas troigo, kiam la israelaj pioniroj fiere diras: «La lando estis nuda de kreskaĵoj: ni plantis ĝardenojn, vinberĝardenojn, oranĝĝardenojn kaj la montarojn ni arbarigis. La lando estis senakva: ni elfosis putojn, metis irigacian reton, tra tubegoj pelas ni la akvon de la Tiberia lago akvumi la dezerton

Negev. Ni traboris vojojn tra montĉenoj kaj asfaltigis ilin. Ni konstruis verdiĝantajn vilaĝojn tie kie antaŭe bojis la ŝakaloj, urbojn, kie antaŭe regis vagdunoj. La marĉojn, kie regis la malario, ni elsekigis.»

Antaŭ 50 jaroj venis tri judaj rajdistoj en la valon Jizreel, por aĉeti tergrundon por tie establi kooperan vilaĝon. En ĉirkaŭaĵo de loko nomiĝanta Nahalal ili vidis ruinojn, kaj inter ili bedueno paŝtis brutaron. Ili demandis pri la ruinoj: «Kio estas tioĉi?»

Respondis la bedueno: «Antaŭ jaroj venis tienĉi grupo de germanoj (evidentiĝis de lia rakonto, ke estis tiuj anoj de la protestanta sekto de «Templistoj») Ili konstruis vilaĝon, veneniĝis pro la akvo kaj parto de ili mortis. La aliaj forlasis la lokon.»

— «Sed jen estas ruinoj de orienta tipo, ĉu ne?»

— «Dum mia juneco sidigis la Sultano ĉitie ĉerkesajn evakuintojn, kies landon konkeris la rusa caro. Ili havis ĉitie vilaĝon, sed kun la sama sorto», respondis la maljuna bedueno.

— «Ĉu araboj neniam loĝis ĉitie?»

— «Jes loĝis, en la tempo de mia avo. Sed en la marĉo regas Baal-Zebub (la demono de la marĉo en la folkloro) kaj ili diskuris.»

La marĉgrundon de Nahalal tamen aĉetis la Juda Nacia Fonduso, kiu fondis tie vilaĝon. La pioniroj drenis, irigaciis la tergrundon. Dum sunardado ili staris en la malbonodora marĉakvo, ili spertis la benon de Baal-Zebub la malarion. Nun estas Nahalal unu el la plej belaj lokoj de la lando.

La landloĝantaro de Israelo estas proks. 2½ milionoj, el kiuj proks. 10 % estas araboj. 50 mil el ili estas nomadaj beduenoj, kiuj iom post iom transiras al loksida vivmaniero.

La iom pli ol du milionoj da judoj de la lando venis tien el ĉiuj mondanguloj, tial la hompejzaĝo de Israelo estas multaspekta kaj diverskaraktera laŭ homaj tipoj, laŭ lingvoj uzataj kaj laŭ vivkutimoj. Pli ol triono de la juda loĝantaro naskiĝis en la lando.

Religiaj konfesoj en Israelo estas reprezentataj de la religioj hebrea muzulmana, kristana, druza, bahaia, karaita, samaritana. Ĉiuj loĝantoj observas siajn festojn kaj ripoztagojn laŭ sia religio.

Sabatoj kaj hebreaj festoj estas oficialaj festoj.

Ĉiuj aliaj religiaj komunumoj estas tute liberaj kaj memstare administras siajn aferojn kaj bonfarajn instituciojn.

Israelo estas lando de disvolvita agrikulturo kaj progresema industrio.

Ĝi eksportas oranĝojn, pampelmusojn, vinberojn, vinon, terkulturajn produktojn, ŝtofojn, teksaĵojn, facetitajn diamantojn, (-la krudaj estas importo), aŭtomobilojn medikamentojn, artefaritajn dentojn, potason, fosfatojn, plastikaĵojn, artemetiajn ellaboritaĵojn, virinajn modajn modelojn k.t.p. Oni disvolvigis vastan reton da kooperaj entreprenoj: terkulturaj industriaj, publikservaj konstruaj, komercaj. La kooperaj vilaĝoj-la tielnomataj «kibbucoj» ambicias solvi ne nur problemojn ekonomiajn kaj sociologiajn, sed ankaŭ etikajn, ili estas modeloj de socialisma vivordo, bazita je socialistaj moralnormoj.

En Israelo troviĝas ĉiuspecaj lernejoj, de la plej simpla elementa lernejo en nova vilaĝeto ĝis la nova granda universitato ekster Jerusalemo. La lasta povas servi kiel pruvo de la nevenkebla spirito, persistemo kaj vivovolo de la juda popolo. Kiam la juda universitato sur Monto Scopus, post la milito en 1948, restis sur la jordana flanko de la limo, kaj tiel fariĝis malpermesata tereno por Israelaj studentoj, la juna ŝtato komencis konstruigi novan universitaton sur kampo ekster la israela parto de la ĉefurbo, Jerusalemo.

La stato de tiu urbo similas al la stato de alia urbo en tio, ke ĝi estas dividita. La malnova, historia parto kun sanktejoj de tri religioj estas en la posedo de Jordano, sed tamen Jerusalemo konservas la karakteron de urbo de la religioj.

La diferenco inter la majeststila Jerusalemo kaj la moderna Tel Aviv estas okulfrapanta. Jerusalemo proklamas: — «Mi estas la landcentro.»

Respondas Tel Aviv: — «Mi estas marstrandejo, apude etendiĝas Israelo.»

Jerusalemo estas urbo pia, Tel Aviv estas urbo liberpensema. Foje venis jerusalemano Tel-Avivon. Sabate li vidis surstrate cigaredfumantajn preterpasantojn. — «Fumi dum Sabato — estas peko,» rimarkis li. «Ne oni diris «estas nia sabata plezuro».

Vidinte la multajn aŭtomobilojn, li diris: «Veturi dum sabata ripoztago -- estas peko».

«Ne» oni repondis, «estas ĝi por ripozigi la krurojn».

Disrevita li revenis en la hotelon kaj petis ion trinki. Oni proponis al li pokalon da brando. Li gustumis kaj trovis ĝin tro forta kaj petis doni al li akvon, por dilui la brandon.





# Sigismundo Pragano

Docento Sigismundo Pragano mortis la 26-an de novembro 1966. Li estis mebro de la Akademio de Esperanto, kaj li estis docento pri Esperanto kaj pri la rumana lingvo ĉe la Universitato en Amsterdamo. Pragano, kies nomo estis Prager, estis rumano, naskita 1907 en Bukureŝto. Li esperantistiĝis 1923, kaj tiel kaptiĝis, ke li dediĉis, sian tutan vivon al Esperanto, kaj eĉ ŝanĝis sian nomon, por ke ĝi havu Esperanton formon. Li malsaniĝis dum lekcio en la universitato, kaj dum pluraj monatoj kuŝis paralizita, sed la 2-an de novembro, do nur mallonge antaŭ sia morto, sin transportigis al la universitato por ĉeesti la doktoriĝon de sia studento Aŝvinikumar. La morto de Pragrano estis granda perdo por Esperanto kaj forta bato al ĉiuj ni, kiuj lin konis.

*JHR.*

# Esperanto Himnaro en la televido

Nia redaktoro Hans Amund Rosbach eldonis ĵus antaŭ Krisnasko himnaron proprakoste. Temas pri cent himnoj, al kiuj li donis Esperantan veston. Dum multaj jaroj li laboris pri la tradukado. La libro, kiu nomiĝas «Cent himnoj» bele prezentiĝas. Recenzo pri la libro sekvos.

La norvega televido atentis pri la evento kaj vizitis pastoron Rosbach en lia hejmo, substrekante ankau, ke tre granda parto de lia privata biblioteko konsistas el Esperanta literaturo.

Ni nur bedaŭras, ke oni ne igis lin legi unu el la himnoj, sed tio eble povos okazi alifoje — se la televidantoj sufiĉe tion deziras!

---

Dilui per akvo tian bonan trinkaĵon—estas vere peko» — diris la kelnero.

«Dank'al Dio», diris la piulo, — «finfine mi trovis agon, kiu estas priopiniata kiel peko, en tiuĉi diboĉa urbo».

Israelo estas respubliko kun 120 membra parlamento (Knesset), kiu elektas ŝtatprezidanton. La nuna prezidanto estas Zalman Ŝazar, kiu estas la Alta Protektanto de la 52-a Universala Kongreso en Tel Aviv 1967.

*Kirsten Ek.*

# 75-jara

La 4-an de aprilo estos 75-jara la animo de la finna Esperanto-novado, magistro Vilho Setälä, konata kiel verkisto, eldonisto, preleganto kaj tre talenta fotografisto. Li estas membro de la Akademio de Esperanto.

# Sigvald S. Ege 75-jara

Tre konata esperantisto en okcidenta Norvegujo, fidela ano de MARA VENTO en Haugesund Sigvald S. Ege iĝis la 4-an de januaro 75 jara.

Ege estas aktiva en la movado ekde 1935, kaj unu el la fonditoj de la klubo en sia hejmurbo. Multon li faris por Esperanto dum ĉi-tiuj jaroj. Li estas la ĉiama instiganto al siaj samklubanoj — agema, laborpreta kaj ideriĉa, kaj li kaptas ĉiun okazon por plikonigi Esperanton kaj antaŭenpuŝi la movadon.

Specialan atenton li oferis al la ebleco de Esperanto sur la turista kampo, kaj kunlaboro kun la loka turisttrafika komitato rezultigis du prospektojn en la lingvo internacia.

Pri sia multjara valora laboro por Esperanto s-ano Ege ricevis la ordenon «Pro Merito». Ni tutkore gratulas postfeste la fidelan kunbatalanton aldonante niajn plej bonajn dezirojn por la jaroj venontaj.

*oto*

## Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23.—30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
*Åbyhöj,* Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la alternejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.—21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

# RECENZOJ

## Vortludo

Pulĉinelo. Konstrua vortludo por 2—6 personoj. Eld.: Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado. Prezo $ 0.50.

Dum multaj jaroj mi pensis pri infanludilo, kiu povus krei ĉe infanoj intereson kaj scion pri Esperanto. Mi eĉ ekdesegnis kartludilon, kies vortoj estu voĉlegataj antaŭ ol ricevi poentojn. Sed ĉio restis nur netralaborita ideo.

Jen kuŝas antaŭ ni preta ludilo, konsistanta el 6 «konstruejoj» kie oni interkruce konstruu vortojn kaj frazojn, el literoj, vortradikoj, prefiksoj kaj sufiksoj, gramatikaj finaĵoj kaj «pulĉineloj», kiuj povas anstataŭigi iun ajn vortelementon. Priskribo de la ludmaniero ĉeestas — kaj je tre modesta prezo la esperantistaj gepatroj povas havigi al siaj infanoj intereskaptan kaj instruigan lernilon.

*H.A.R.*

## Frisaj Rakontoj

Frisaj rakontoj en Esperanto.
Eldonis: «Fryske Akademy», Leeuwarden.
Prezo ne indikita.

La frisaj rakontoj aperis en nederlandlingva traduko en la fino de oktobro 1960, okaze de jubileafesto de frisa studenta klubo.

En nederlandlingva traduko! Norvegoj ja baraktas kun la dulingveco, kaj oni povas legi, kelkfoje, en la gazetoj plendojn pri nekomprenebleco de jena aŭ alia esprimo. Sed neniam oni trovis necese, traduki la librojn de la aŭtoroj neonorveglingvaj!

Ni jam antaŭe konis kelkajn landojn kun la dulingveca problemo. Nun alvenis do ankaŭ Nederlando al la vico. Laŭ vortolisto en la libro, oni povas vidi, ke kiel la nederlanda lingvo similas al la germana, tiel la frisa parencas al angla. Ekzemple la vorto pensi en la frisa nomiĝas tinke, en la nederlanda denken. Tago estas dei en la frisa, dag en la nederlanda.

Kia do estas la lingvopolitika situacio? «De post 1815 Frislando estas provinco de la reĝlando Nederlando. En la elementaj lernejoj de Frislando estis instruata ne la frisa, sed la nederlanda lingvo . . . La ĵurnaloj en Frislando aperas en la nederlanda lingvo, sed havas siajn frislingvajn partojn kaj specialajn rubrikojn . . . Privataj kursoj estas subvenciataj ek de 1927; en la universitatoj de Groningen, Utrecht, Leiden kaj Amsterdam estas profesoroj pri la frisa lingvo.» Norvegoj do komparu kun nia lingva situacio!

La frisaj rakontoj estas moderna literaturo, noveloj kiuj respegulas la diversflankan vivon de kamparanaro. La traduko estas bona, eraroj malmultas. Kiel esperantistoj ni do denove trovis okazon renkonti fremdan literaturon, kiun la neesperantistoj ne renkontos — kaj, kio al mi ŝajnas tre grava, ankaŭ la lingvosituacion en alia lando kun lingva minoritato.

Bonvenon, «Frisaj Rakontoj».

*R.*

## Himnoj

Himnaro Esperanta. Kompilita de Montagu C. Butler, kvina eldono, 1966.

Tiu la plej granda kaj plej konata himnaro de la esperantistaro reaperis en kvina eldono, kun novaj himnoj. La unua eldono aperis 1907 kun 26 himnoj. La nuna havas 280 himnojn kun 56 muzikaj kliŝoj.

Oni do povus atendi, ke la himnaro ĉerpis el la granda internacia himnotrezoro. Sed tiel ne estas. La kompilinto «post diligenta serĉado en la tuta Esperanta Kristana literaturo» trovis «nur malmultajn himnojn konformaj al niaj kriterioj». Tial la himnaro estas angla esperanta himnaro. Norvegoj nur malofte trovas himnon jam konatan.

Al himnoŝatantoj ĝi estas vera trezorujo, kaj per ĝi la esperantistoj havas novan ilon por atingi al fremda literaturo.

*Haro.*

FILATELISTOJ!

Estas fondita Esperantista Sekcio de Hungaraj Filatelistoj, kun 100 membroj. En nia laborplanto estas i. a. diskonigo de Esperanto inter la filatelistoj, kolekto de Esperantaj filatelistaj esprimoj, kolektado de Esperantaj kaj aliaj poŝtmarkoj k. t. p.

Ni volonte akceptas novajn interŝanĝemulojn kiel membrojn. MABEOSZ, Sekcio de Hungaraj Filatelistaj Esperantistoj, Népköztársaság u. 3, Budapest VI, Hungarujo.





# 52-a Universala Kongreso de Esperanto
# Tel Aviv, 2-9 Augusto 1967

*Alta protektanto:*

Zalman Ŝazar, Ŝtatprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso de la Kongreso:
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

*Situacio en Israelo.*

El diversaj partoj el eksterlando venis leteroj al LKK petantaj informojn pri la nuntempa politika situacio en Israelo.

Kvankam oni ne povas nei certan streĉitecon en la politikaj rilatoj inter Israelo kaj la ĉirkaŭantaj landoj, LKK konstatis el la menciitaj leteroj kaj el aliaj fontoj, ke en eksterlando la bildo, kiun oni havas pri tiu situacio estas troigita kompare kun la reala. La Loka Kongresa Komitato deziras informi ĉiujn interesiĝantojn, ke neniu danĝero ekzistas nuntempe por kiu ajn troviĝanta en Israelo kaj certe ne por turistoj. En ĉiu parto de la lando la vivo disvolviĝas en tute normala maniero, kaj absolute ne estas videblaj iuj ajn signoj de streĉitecoj aŭ danĝeroj en la vivo de la lando. Pri tiu ĉi reala situacio, krom la Konstanta Kongresa Sekretario, kiu jam de pluraj monatoj troviĝas en Israelo, povas atesti la miloj da eksterlandaj turistoj, kiuj nuntempe troviĝas en la lando. La Loka Kongresa Komitato petas ĉiujn interesiĝantojn komplete fidi je ĝiaj asertoj kaj tute trankvile plani sian vojaĝon al Israelo.

*Honora Komitato.*

Krom la pli frue menciitaj personecoj, akceptis lastatempe aliĝi al la Honora Komitato de la 52-a U.K. S-ro Moŝe Koll, Ministro por la Turismo, kaj D-ro Moŝe Avidor, Prezidanto de la Israela Nacia Komisiono por UNESKO kaj Membro de la Plenumkomitato de UNESKO.

## Programo de la landa kongreso

(provizora)

Sabate la 13an de majo:

Interkona vespero en la kongresejo Sauda Klubb. Je la 20a horo. Prezo kr. 10,00.

Dimanĉe la 14an de majo:

Jarkunveno de N E L en Sauda Klubb. Lunĉo je la 13a horo. Prezo kr. 6,00.

Festo en Sauda Fjord Hotel. Je la 19a horo. Prezo kr. 30,00.

Lunde la 15an de majo:

Eventuala daŭrigo de la jarkunveno.

Ekskursoj. Lunĉo je la 13a horo. Prezo kr. 6,00.

*ANONCADO KAJ MENDO*

Partoprenantoj en la landa kongreso bonvolu anonci sin antaŭ la 15a de aprilo al la sekretario Elna Matland, Brekkeveien 50, Sauda. Samtempe ni petas vin sciigi kie vi deziras loĝi. Estas jenaj eblecoj:

Sauda Fjord Hotel, prezoj por unuopa ĉambro kr. 24,00 (kr. 30,00 kun banejo), por duopa ĉambro kr. 40,00 (kr. 50,00 kun banejo).

Grand Hotell; por unuopa ĉambro kr. 16,00 — 25,00, por duopa ĉambro kr. 30,00 — 35,00; por triopa ĉambro kr. 45,00. Servado estas inkluzive en la prezoj.

Kunsendu la kunvenkotizon kr. 10,00!

*Dua Bulteno.*

Ĉiu aliĝinto baldaŭ ricevos la Duan Bultenon. En ĝi troviĝos ĉiuj informoj koncerne la mendojn por loĝado, ekskursoj, bankedo, k.t.p. La Loka Kongresa Komitato varme konsilas al ĉiuj interesiĝantoj resendi, plenigitaj, la koncernajn mendilojn tuj post ricevo de la Dua Bulteno.

*Loĝado.*

Kiel pli frue anoncite, LKK povos akcepti mendojn por loĝado nur ĝis la 1-a de majo 1967. Post tiu dato LKK ne plu povas certigi loĝadon.

*Statistiko* (Ĝis 25.1.67):

Arg. 4, Aŭstral. 3, Aŭstrujo 8, Belg. 15, Braz. 2, Brit. 37, Bulg. 30, Ĉeĥ. 17, Dan. 17, Finn. 3, Franc. 104, Germ. 16, Hisp. 10, Hong. 1, Hung. 38, Isr. 69, Ital. 33, Jap. 4, Jug. 22, Kanado 3, Monako 5, Ned. 31, Norv. 6, NZ 1, Pol. 90, Portug. 2, Rum. 1, Sov. 3, Sved. 26, Svis. 9, Us. 23, Ven. 1, Entute (32 landoj): 634.

*G. G. Pompilio — K.K.S.*

---

## 20-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en 1967

La ĉijara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en TORRE PELLICE, ITALUJO, de la 22-a ĝis la 29-a de julio, kio donas la eblecon, poste ĉeesti la U.K. en Tel Aviv.

Nia kongreso okazos en la centro Valdesa t.e. la centro de la Protestantoj en Italujo.

Torre Pellice situas okcidente de Torino, ĉe la piedo de la Alpoj. La regiono estas tre pitoreska kaj multe vizitata de turistoj. Tial estas necese frue aliĝi, por ke ni sciu, kiom da litoj ni devos rezervi. Post la 1-a de junio ni ne plu povos akcepti aliĝojn. La kotizoj por partopreno de la kongreso, kun tranoktado, manĝado kaj unu tuttaga ekskurso sumiĝas:

1. Kongresano 130 ned.gld.
2. Edz(in)o de kongresano 115 ned.gld.
3. junulo ĝis 20 jaroj kun propraj enspezoj 125 ned.gld.
4. junulo ĝis 20 jaroj sen propraj enspezoj 115 ned.gld.

RABATO: Membroj de KELI de la kategorioj 1,3 kaj 4 rajtas rabaton de 10 ned. gld.

Edz(in)o de mebro de KELI, kategorio 2, rajtas rabaton de 5 ned.gld.

Pliajn informojn donos al vi:

F-ino Putto,
Schaapsweg 139,
EDE (Gld.) NEDERLANDO.

---

## Korespondu!

3) 20 gekursanoj, 20—60 jaraj el div. prof. serchas koresp. el la tuta mondo, prec. el nordeuropaj landoj: Kulturbund—Esperanto, Georg Eckert, 23 Stralsund, Maria Krohn-Str. 4, Germ. Dem. Resp.

4) Interlingvistikan k esperantologian literaturos serchas aceti Detlev Blanke, 2401 Dorf-Mecklenburg, Germ. Dem. Resp.

---

*NORSK ESPERANTO-FORBUND*
*(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:* Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

*ESPERANTOFORLAGET A/S*
*(Eldonejo Esperanto A/S)*
Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.32
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

*La redakcio:*
Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun adreson, kiam temas pri uĝaj sendaĵoj.
Telefono: 54 727



Østlendingens Trykkeri, Elverum